

ELNA NEWSLETTER

NEWS OF THE LANGUAGE PROBLEM AND ESPERANTO AS A SOLUTION

Bimonthly organ of the Esperanto League for North America, Inc., P. O. Box 508, Burlingame, CA 94010, U.S.A. Telephone: [415] 343-3844. Editor: Charles R.L. Power. Includes promotional section in English and informational section in Esperanto for ELNA members.

Vol. 12, No. 4/5. July-October 1976.

WALDHEIM: LOST IN TRANSLATION

While much of the world was wrapping up its celebration of the American bicentennial, UN Secretary-General Kurt Waldheim was on his way home from the tiny island nation of Mauritius where he had addressed the 13th annual meeting of the Organization of African Unity. But before he would even get over the jetlag, the Secretary-General was to find himself caught up in the turmoil created by the Israeli raid on Entebbe airport, thanks to a seemingly innocent interview in the middle of the night in Cairo.

Waldheim, who was notified of the Israeli action by New York headquarters on the morning of July 4, left Mauritius later that day on a commercial airliner bound for Germany. He was looking forward to a day's rest at his family home near Salzburg. Austria after three heavily scheduled days of meetings with African foreign ministers and heads of state, including two sessions with Uganda's Idi Amin to discuss the plight of the 104 Israeli hostages then being held in that country. The Secretary-General had publicly condemned the act of terror, as he had previous ones, and was working behind the scenes for the safe return of the hostages.

Waldheim's jet skipped a scheduled stop at Entebbe, where Amin's MiG fighters lay still-smoldering following the Israeli rescue operation of the night before, and refueled instead at Dar es Salaam, before eventually putting in at Cairo for a two-hour layover.

International protocol accords the Secretary-General the rank of head of state, so that even at two o'clock in the morning his arrival in Cairo was attended by the usual amount of pomp and circumstance. Senior UN officials were there to greet him, as were a deputy to the Egyptian foreign minister and a single journalist from the semi-official Cairo daily, Al-Ahram.

The reporter, a woman who appeared to be in her late thirties, questioned Waldheim on a number of topics before asking the inevitable question on Entebbe. An aide from the UN Information Center in Cairo was recording the interview; according to this tape, which was made available to journalists in New York several days later, Waldheim said, "I haven't got all the details, but it seems to be clear that Israeli aircraft have landed in Entebbe and this constitutes a serious violation of the sovereignty of a member state of the United Nations."

The next day, the roof fell in. The story ran in Al-Ahram and was distributed in Arabic throughout the Mideast by the Middle East News Agency (MENA). Both Reuters and UPI picked up the story from MENA, retranslated it from the Arabic and put it out world-wide. Whether or not the Arabic account contained a hyped-up version of Waldheim's words is not yet clear, but the wire service translations back into English were much stronger than the original — Reuters quoted him as saying the Israeli raid was "flagrant aggression" against a member state.

Major newspapers throughout the West reacted strongly to the misquoted phrase, and a segment of the British Parliament called for Waldheim's resignation. Editorials were critical and even

cutting — The Washington Post called him the "Charlie McCarthy" of the Afro-Arab bloc.

It was only a matter of hours before Reuters realized the error; a corrected version went out the next day. The Washington Post and the Wall Street Journal eventually retracted their editorials, though the latter waited until July 29.

Reuters' managing director, Gerald Long, in a letter of apology told Waldheim, "Unfortunately, people remain moved by words even when it is shown they were not uttered." Many of the Secretary-General's friends, and possibly Waldheim himself, wish he had said nothing in Cairo at all.

The Inter Dependent (organ of the United Nations Association), Sept. 1976.

BRITISH STUDENTS TUNE IN TO ESPERANTO

Students in seven British universities are to broadcast an Esperanto course this October over their campus radio stations. The course, "Jen Nia Mondo", was produced by a group of Esperanto radio enthusiasts following a request by students at Essex University (in Colchester, England).

Thirteen universities in Great Britain now have their own student-run radio stations, which are independent of the BBC. The course is being distributed through the National Association of Student Broadcasting, who recently announced a student Esperanto competition with prizes totalling 500 pounds.

ESPERANTO FOR THE OLYMPICS


All eleven thousand athletes at the Montreal Olympic Games in July were given an Esperanto phrase book to help them solve their language problems. The book had been specially prepared by the Canadian Esperanto Association.

Its aim is to "help sportsmen further the Olympic ideal by making friends with athletes of other countries." It was prepared in thirteen languages, and was designed for simple conversations when athletes have no common language, and there is no interpreter near.

Welcoming the book, the President of the Olympic Organizing Committee, M. Roger Rousseau, said, "Esperanto's goal is clear: to bring people of all nations closer together through the medium of a common language. In much the same manner, the Olympic Games strive for brotherhood and goodwill through competitive sport."

The book, "Saluton, Amiko", was compiled by Mr Ralph Harry, who is the Australian Ambassador to the United Nations. It contains such phrases as "Did you break the Olympic/world record?" (Ĉu vi rompis la olimpikan/mondan rekordon?), and "May the best man win" (La plej bona venku!). Expressions were listed for twenty-one sports.

Esperanto functioned as the key language along with English and French. A half-dozen other languages were added for the benefit of other large language blocs.



Although its name may scare away the uninformed, Iceland has a plentiful supply of un-icy water for swimmers.

WORLD ESPERANTO CONGRESS: REYKJAVÍK

Reykjavík, Iceland, will be the site of the 62nd World Esperanto Congress, to take place from June 30 to August 6, 1977.

This will be the fifth World Esperanto Congress to be located outside Europe. Three times the United States has been favored: in 1910, when the 6th Congress came to Washington, DC; in 1915, when, due to the World War, a scant 163 Esperanto speakers signed up for the 11th (and smallest) Congress; and most recently in 1972, when the 57th Congress was greeted by Portland, OR. The only other non-European World Esperanto Congress was the 50th in Tokyo, 1965. One other Congress was set to occur outside Europe, but it was unfortunately set for Tel Aviv in 1967, when events beyond the control of the Esperanto movement forced a relocation to Rotterdam.

Fortunately, no escalation of the Cod War seems likely to make any relocation necessary for 1977. Congress members will be able to experience Iceland's surprisingly moderate summer climate and vast, colorful, smog-free horizon. Those interested in an extended summer vacation may wish to inquire at Icelandic Airlines about one of its specialties, a continuation flight to Luxembourg.

An official invitation to the Congress has been made by Reykjavík's mayor, Birgir Ísleifur Gunnarson. The invitation can be found in the first Congress Bulletin, which was recently distributed to members of the World Esperanto Association.

As always, there is a schedule of Congress fees which makes it advantageous to sign up early. Until this year's end the fees will be as follows, subject to change in the dollar/guilder exchange rate:

1. Person who is not an individual member of UEA	\$63.50
2. UEA member with <i>Jarlibro</i>	53.90
3. UEA member with <i>Jarlibro</i> and magazine <i>Esperanto</i>	44.25
4. Spouse of Congress member in category 1	44.50
5. Spouse of Congress member in category 2 or 3	37.75
6. Young person under 21	19.05
7. University student under 31	31.75
8. Blind person	25.40

Congress fees must be accompanied by an official congress application. If you do not have one, request a copy from ELNA or UEA's U.S. agent, Armin F. Doneis, who can also accept Congress fees. Write to Armin F. Doneis, P.O. Box 105, Pharr, TX 78577.

ESPERANTO IN ISRAEL

The Israeli Ministry of Tourism has issued an interesting directory to the Esperanto movement in Israel. The directory, in English, includes such information as "Streets have been named after Dr. Ludwig Lazar Zamenhof [creator of Esperanto] in Tel Aviv, Jerusalem, Netanya and Qiryat Ata", and "In the courtyard of the Church of the Magnificat, En Kerem, one of the plaques with the Magnificat is also in Esperanto."

The directory (I.L. No. 134, Dec. 1975) can be obtained by writing to the Consul for Cultural Affairs, Israeli Consulate, 6380 Wilshire Blvd., Los Angeles CA 90048.

INCREASING ATTENTION TO ESPERANTO

The specialist literature in linguistics, language sociology and international communications has recently shown a clear increase of interest in the international language.

Three recent examples can be cited, from three language regions: English, French, and Dutch. The best-known informational bulletin for specialists in sociolinguistics, *Sociolinguistics Newsletter*, in its summer 1976 issue (vol. 7, no.2), includes several items on the international language, including a detailed announcement of the World Esperanto Congress and the subjects to be discussed there, and an announcement on the new series *Esperanto Documents*.

In the French language territory, a recent publication of the Union of International Associations, *Les Problemes du langage dans la societe internationale* (Brussels, 1975) includes as document no. 28 a table of the most widely spoken languages of the world, giving a figure for speakers only when a language has a minimum of one million users. Esperanto is listed, with one million speakers (and an indication that they are to be found in the developed rather than the underdeveloped countries). That figure, parenthetically, seems more realistic than several higher ones published elsewhere by M. Pei and others.

A third example comes from a field in which misinformation and deliberate silence on the international languages were once particularly strong: the literature of linguistics and sociology. A Dutch popular science work, *Taalsociologie/Minderheden/Tweetaligheid/Taalachterstand* (Language sociology/Minorities/Bilingualism/Linguistic underdevelopment) by Dr. Lieuwe Pietersen, a Frisian already known for his studies in Dutch and English on sociolinguistics and language attitudes, particularly with reference to his own people, the Frisian minority of the Netherlands, dedicates several pages to Esperanto. Although his remarks on Esperanto culture are incorrect, some information on the language is quite fresh and accurate. For instance, Pietersen distinguishes between a territorial language movement (e.g. Basque, Frisian) and a non-territorial (the essentially international movement for Esperanto). This may be the first time that such an important sociolinguistic distinction has been made in a work on general sociolinguistics destined to a wide readership and written by a non-Esperantist.

In addition, it should be mentioned that Dr. Richard E. Wood will be guest editor of a forthcoming issue of the *International Journal of the Sociology of Language*, to be dedicated to the formation of an international language, with attention to its sociological aspects. The issue will probably consist of an equal number of articles in English and French, written by colleagues in Switzerland, the United States, Canada, West Germany, Australia and Britain.

(Translated from a release by Richard E. Wood.)

KONGRESA RAPORTO

De la 22a ĝis la 25a de julio 1976 kunvenis la 24a Kongreso de Esperanto-Ligo por Nord-Ameriko, ĉe San-Franciska Ŝtata Universitato en Kalifornio. Aligis 109 kongresanoj el dek ok usonaj ŝtatoj kaj tri aliaj landoj (Anglujo, Japanujo, Kanado).

D-ro B. J. Balcar, prezidanto de la Loka Kongresa Komitato, bonvenigis la kongresanojn kaj prezentis la LKK-anojn.

William R. Harmon, prezidanto de ELNA, oficiale malfermis la Kongreson kaj, post kelkaj anoncoj pri la programo, nomis la Balotan kaj Proponan Komitatojn. Sekvis salutoj de lokaj societoj kaj aliaj, traktitaj de vicprezidanto Bonnie Helmuth: Nov-Meksio; Teksaso; Milwaukee, WI; Kanada Esperanto-Kongreso; Hoosac Valley, MA; Portland, OR; Sacramento, CA; la Sud-Teksasa Esperanto-Ligo; Vancouver, Kanado. Letere salutis Von Nimitz Esperanto-Klubo (San Antonio, TX), la tendaro "Esperanto kaj Naturo" (Estonio) kaj Universala Esperanto-Asocio.

Prez. Harmon legis parton de letero de Humphrey R. Tonkin, reprezentanto de ELNA ĉe la Komitato de UEA (kaj krome prezidanto de UEA), kiu menciis la elekton de Mark Starr al honora membreco kaj la eldonon de la nova serio *Esperanto-Dokumentoj*. Prez. Harmon atentigis ke lia propra raporto, tiu de d-ro Tonkin kaj tiuj de la Usona cefdelegito, la kandidatiga komitato, la Centra Oficejo kaj la Arkivo aperas presite en la programo, kaj ke oni do ne laŭtleĝos ilin. Aldoniĝis raportoj de la Ekzamena Servo kaj la financa komitato, kiujn oni multobligis kaj disdonis.

Prez. Harmon menciis la laboron de Kanada Esperanto-Asocio ĉe la Olimpikaj ludoj, kaj la eblecon, ke ELNA-anoj helpu finance subteni tiun agadon. Li raportis ankaŭ pri saluto kaj helpoferto el Kubo, al kies movadeto ELNA regule sendas sian organon.

James W. Deer, Komisiito de UEA pri la Konversacia Lingvo, parolis pri kasetoj haveblaj ĉe la libroservo de la Kongreso. Tiuj dudek kvin kasetoj, kiujn li donacis al ELNA, preskaŭ ĉiuj forvendiĝis dum la Kongreso.

S-ino Roan Orloff Stone parolis pri la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno. S-ro Charles R.L. Power aldonis al tio, ke ĵus aperis la dua volumo de la alfabeto katalogo de IEMW, kaj ke la kompleto estos havebla al ELNA-anoj je favora prezo. Unu ekzemplero iris al la Arkivo de ELNA.

Jack Lesh raportis pri sia vizito al la brazila esperantista komunumo **Bona Espero**, kaj cirkulis fotojn de tiu vizito.

Inĝ. R. Kent Jones sciigis, ke li prelegos ĉe la 12a Konferenco de la Usona Akvorimeda Asocio en Ĉikago ĉi-septembre pri "Lingvaj Malhelpoj al la Utiligo de Akvorimedoj", kaj ankaŭ pri "Historio de Kloakoj."

Prez. Harmon prezentis la ĉeestantajn estraranojn kaj laŭdis ilin pro laboro dum la pasinta jaro.

S-ino Saranath sendis leteron al ELNA, kiun legis prez. Harmon, dankante pro librodonaca helpo al la hinda Esperanto-movado. Estis klarigite, ke tiun librodonacan helpon ELNA dividis kun kanada, aŭstralia kaj nov-zelanda landaj asocioj, sub kunordigo de d-ro Renato Corsetti, komisiito pri regiona agado de UEA.

Mark Starr raportis sian agadon kiel reprezentanto de ELNA ĉe la Usona Misio al UN, klarigante, ke temas pri pure informa funkcio, neniel kontraŭa al la neŭtraleco politika de ELNA. Li ofertis sendi informojn pri UN-aferoj al interesitaj membroj de ELNA.

Prez. Harmon parolis pri provoj fari la Ligon peranto de japane fabrikata tajpilo "Brother", kiu havas esperantajn kaj multegajn aliajn akcentojn en sia klavaro. La intertraktado bedaŭrinde ne alportis fruktojn, ĉar la firmao postulis tro altan mendon. Prez. Harmon ankoraŭ intencas trakti kun UEA, Japana Esperanto-Instituto kaj eventuale aliaj asocioj pri eventuala komuna mendo.

Nomitaj de la prezidanto estis jenaj Komitatoj:

Komitato pri Semajno de Internacia Amikeco: Ken Thomson, Roan Orloff Stone.

Komitato pri UN-Aferoj: Mark Starr, Marion Newell Lorie, Minerva Massen.

Komitato pri la C.O.: Charles R.L. Power, Catherine Schulze, William R. Harmon.

Financa Komitato: Dorothy C. Jones, William H. Schulze, Charles R.L. Power, William R. Harmon.

Eldona Komitato: Charles R.L. Power, d-ro Richard E. Wood, Thomas H. Goodman, Hal Dreyer, Wm. R. Harmon.

Kandidatiga Komitato: Armin F. Doneis (estro), Allan C. Boschen, James W. Deer.

Pri instigo de UEA, ke ĉiu landa asocio formu komitaton por parlamenta agado, kiu informadu parlamentajn reprezentantojn kaj senatanojn pri Esperanto kaj ties bonoj, raportis prez. Harmon. Post diskuto, ŝajnis esti la ĝenerala sinteno, ke lokaj societoj povus efike misiumi kun la lokaj parlamentanoj. Tamen prez. Harmon kaj aliaj konsilis, ke por eviti eventualajn kontraŭefikajn agadojn, la afero estu direktata en iu centra loko, provizore la C.O. de ELNA.

Ken Thomson raportis por la Komitato pri SIA, ke necesos baldaŭ represigi la poŝtkartojn kaj afiŝojn de SIA. Estis sugestite, ke ne ELNA sed UEA eldonu ilin, ĉar ili ne sufiĉe vendiĝas en Usono por pravigi investon de la financaj rimedoj de ELNA. Estis cetere sugestite, ke oni produktu kaŭĉukajn stampilojn kun la SIA-simbolo.

KAPITALO ANKORAŬ BEZONATA

Prez. Harmon komentis pri sia presita raporto, emfazante la bezonon por kapitalo, kiu sekurigos la bazajn kostojn de la Ligo kaj ebligos, ke donacoj pri ofte aplikiĝu al specialaj projektoj. Tiu tempo ankoraŭ ne venis, sed almenaŭ tri membroj jam informis, ke ELNA estis nomita iugrada heredonto en testamento, kaj aliaj pripensas tion. Prez. Harmon volonte klarigos al interesitoj la diversajn manierojn, laŭ kiuj oni povas donaci al ELNA plej avantaĝe ne nur al la Ligo, sed ankaŭ al la donacanto.

La presita raporto de d-ro Tonkin sciigis i. a. pri la "efektive tre maltrankviliga...falo en la nombro de individuaj membroj de UEA en Usono," kiu estis "unu el la plej grandaj en la tuta mondo." Li ankaŭ esprimis bedaŭron, ke Usono en 1976 cedis sian unuan lokon en Societo Zamenhof al Svedujo, "kvankam ankoraŭ restas tempo ŝanĝi tiun situacion." Li sekve petis, ke la usonaj esperantistoj pri fruktodone varbu kaj por UEA kaj por la venonta UK en Islando. Cetere li instigis al pli efika subteno de la agado ĉe UN; propra agado parlamenta, t. e. ĉe la Usona Kongreso en Vaŝingtono; sistema agado inter universitatoj; kaj kunlaboro en la Financa Programo de la Esperanto-Movado. Estas ankaŭ menciinde, ke d-ro Tonkin laŭdis kelkajn usonajn kunlaborantojn de UEA: d-ro Jonathan Pool, estrarano de CED; d-ro Richard E. Wood, redaktoro de *La Monda Lingvo-Problemo*; Mark Starr, honora membro de UEA, ĉe UN; Afonso Henriques Correa, kiu komencas fari similan kvankam ĝis nun neformalan laboron ĉe Organizo de Amerikaj Ŝtatoj; kaj d-ro Pierre Ullman, unu el la juĝantoj de la Belartaj Konkursoj.

Pri la raporto aŭdiĝis diskuto ĉefe pri *LMLP*, kiu antaŭ kelkaj jaroj montriĝis inter la plej monperdaj entreprenoj de UEA. Komentoj kaj atakaj kaj defendaj aŭdiĝis. El unu vidpunkto, ŝajnas bona ideo havi lokon por publikigi materialon pri la monda lingvo-problemo kaj eventuale pri Esperanto kiel solvo; el alia vidpunkto estus bona ideo kontribui tiajn studojn al diversaj lingvistikaj revuoj, kies legantaro konsistis malpli el homoj jam favoraj al Esperanto. Iom konsternite montriĝis, ke raporto pri la financoj de *LMLP* ne aperis en la estrara raporto de UEA por 1975-76. Prez. Harmon diris, ke la diskuto estos raportita al d-ro Tonkin.

La presita raporto de la usona ĉefdelegito de UEA, Armin F. Doneis, sciigis pri kunlaboro kun la C.O. de ELNA por komuna dissendo de aliĝiloj lastjare. La tekston s-ro Doneis kaj la C.O. preparis kunlabore, kaj la C.O. presigis kaj dissendis la foliojn per sia poŝtpermesilo, kio multe reduktis la koston de la tuta afero. Forfalon de membroj s-ro Doneis atribuis al financaj

cirkonstancoj, i.a. altiĝo de la UEA-kotizo.

Grava ero en la raporto de la Centra Oficejo estis la nekontentigaj spezoj de la libroservo. La libroservo nun havas tre bonan stokon, fakte iom tro ŝvelintan. (Tiu problemo cetere pligrandiĝis de post la Kongreso pro akiro de la tuta stoko de du antaŭaj usonaj libroservoj, kio prezentas eĉ fizikan problemon por la limigita spaco de la oficejo.) Dankojn la direktoro de la C.O., Charles R.L. Power, direktis al Catherine L. Schulze, Gigi Harabagiu, William R. Harmon, Donna Barnhill kaj aliaj pro daŭra kunlaboro.

F-ino Daibuzono mieko el Japanujo salutis la Kongreson kaj mallonge raportis pri sia veturado de okcidenta ĝis orienta Usono kaj reen, kiun multe plibeligis la kontakto kun usonaj esperantistoj.

Prez. Harmon raportis pri la heredaĵo Turner, kiu konsistas el la tuta stoko de la iama libroservo Esperanto Library. Por aranĝi interkonsenton inter ELNA kaj s-ino M. B. Sellery, filino de la forpasinta Glenn P. Turner, multe helpis Armin F. Doneis. La finajn negocojn en la komplika afero faris prez. Harmon kun la subteno de la Estraro de ELNA.

Sekvis diskuto pri la valoro de reklamoj kaj anoncetoj por varbado al Esperanto kaj ELNA. Oni ĝenerale opiniis, ke tiu metodo estas refoje provinda, sed specifa decido ne okazis.

INSTIGU LA BIBLIOTEKON

Prez. Harmon raportis pri la biblioteka kampanjo, pri kiu ELNA kaj UEA planas kunlabori. Li diferencigis la celojn de ELNA kaj UEA: Dum tiu lasta volas vendi kelkajn gravajn (kaj plejparte multekostajn) librojn al bibliotekoj, la Ligo volas entute pligrandigi esperantajn kolektojn per kaj donacoj kaj instigoj aĉeti. Eblas, ke la Turner-heredaĵo estos uzata parte tiucele. Li petis, ke esperantistoj sciigu la Centran Oficejon pri la titoloj jam en sia respektiva biblioteko, por ke ELNA povu konstati la breĉojn ŝtopendajn.

S-ino Schulze komentis, ke prefere la lokaj esperantistoj instigu la propran bibliotekon aĉeti pli da esperantaj libroj, kaj plendu pri nesufiĉeco de la esperanta kolekto. Ŝi menciis la bezonon por ĝisdata verko pri Esperanto en la angla.

Al sugesto, ke la libroservo permesu uzon de la pli gravaj kreditkartoj (BankAmericard, MasterCharge ktp.), s-ro Power respondis, ke tiu ebleco jam estis esplorita kaj montriĝis netaŭga pro diversaj motivoj, ĉefe pro la relative malgrandaj enspezoj de la libroservo. Kreditkartaj firmaoj ne interesiĝas pri tiel malgrandaj entreprenoj.

Post anonco pri publika alirebleco de la okazonta estrara kunsido, la unua ĝenerala kunveno fermiĝis.

PACIFIKA KONGRESO EN 1980?

Por la sekva estrara kunsido ĉeestis prez. Harmon, vicprez. Bonnie Helmuth, kasisto Dorothy C. Jones, sekretario Robert E. Bailey kaj estraranoj Allan C. Boschen, R. Kent Jones, Charles R.L. Power kaj Ken Thomson. Aliaj kongresanoj, nemembroj de la estraro, ĉeestis la kunsidon.

En la kunsido diskutiĝis diversaj aferoj, el kiuj rezultis kelkaj rezolucioj poste akceptitaj. Rilate al la estraro mem, estis decidite doni specifan taskon al ĉiu estrarano, laŭ la modelo de UEA. Komence, prez. Harmon petis vicprez. Bonnie Helmuth preni sur sin la devojn rilatajn al regiona agado kaj lokaj societoj, kaj ŝi akceptis.

Pri eldonado oni decidis provizore forlasi la anglan-esperantan vortaron de Peter J. Benson. Tiun decidon iugrade influis interesiĝo ĉe UEA. Se UEA decidus kontraŭ ĝia eldono, ELNA eble refoje interesiĝos, sed la projekto aspektas por la momento iom tro ampleksa por la nun disponeblaj fortoj de la Ligo.

Estis principe kaj provizore aprobita la ideo okazigi la duan Pacifikan Esperanto-Kongreson en San-Francisko en 1980, eble kunlige kun la tiujara Kalifornia Esperanto-Konferenco. Estis emfazita la neceso de plena politika neŭtraleco en tia aranĝo, al

kiu oni devus inviti ekzemple ĉiujn aziajn esperantistojn sen escepto.

Por plirapidigi la preparon de la novaĵletero, estis decidite forlasi la aranĝon antaŭan pri redakcia komitato. Oni esprimis dankon al la komitatoj pro ties utila ĝisnuna laboro.



Nova honora membro de ELNA estas Lehman Wendell, usona pioniro el Svedujo. Ankoraŭ lastjare aperis artikolo de li pri Esperanto en dentista gazeto.

Ĉe la dua ĝenerala kunveno prez. Harmon anoncis tri rezoluciojn. Du estis honoraj membrigoj: por poeto, literatoro kaj pedagogo William Auld el Skotlando, kiu ĉiusomere gvidas la plej prestiĝan Esperanto-kursaron en Usono ĉe San-Franciska Ŝtata Universitato, kaj kiu tiom helpis antaŭenigi Esperanton en Usono; kaj por usona pioniro Lehman Wendell, kiu naskiĝis en 1878, esperantistiĝis en 1907, kaj multe tradukis kaj verkis en kaj pri la lingvo internacia. Inter liaj verkoj estas *Sep ridoj*, *Sub la meznokta suno* kaj noveltraduko sciencifika *La lasta usonano*. Honora membro Wendell estas nun verŝajne la plej aĝa membro de ELNA kaj plejjara veterano inter ni.

La tria rezolucio estis decido informi la usonan esperantistaron pri la trideka datreveno de Unesko, okazonta la 4an de novembro 1976, kaj helpi disdoni la materialon provizotan de Unesko por tiu celo.

La unuaj du proponoj estis aprobitaj per aklamado, la tria brakleve per granda plimulto.

AKTIVAS LA ARKIVO

La estro de la proponkomitato, William W. Glenny, raportis pri tri proponoj de la arkivisto de ELNA, d-ro B.J. Balcar. La tri proponoj efektive priskribis tri laborkampojn, ĉe kiuj la Arkivo devus labori, sed por kiuj ĝi bezonos la kunlaboron de laŭeble multaj usonaj esperantistoj.

La unua laborkampo estas la kolektado de ĉiuj eldonaĵoj (libroj, libretoj, gazetoj, faldfolioj, flugfolioj, glumarkoj ktp.) kiujn eldonis, verkis, tradukis aŭ ilustris usonanoj, aŭ kiuj rilatas al Usono mem. Ĉi tiun laboron la Arkivo jam de jaroj plenumadas, sed restas en ĝi multaj mankoj, kiuj ofte estus facile forigeblaj per

kunlaboro de usonaj esperantistoj.

La dua, eble plej ambicia projekto de la Arkivo estas nova eldono de la biografietaro *Kiu estas kiu inter usonaj esperantistoj*. F.A. Postnikov publikigis tri eldonojn de tiu tre valora verko en 1945, 1948 kaj 1950. Por havigi materialon por kvara eldono ELNA elsendos al ĉiuj siaj membroj demandaron pri la vivo kaj Esperanto-agado. Ankaŭ petata estas materialo pri forpasintaj esperantistoj, por ke ankaŭ pri ili detaloj povu konserviĝi en taŭga formo.

La tria propono estas kompili historion de la usona movado en formo de liberfoliaj albumoj kun bildoj kaj dokumentoj (proklamoj, rezolucioj, eltranĉaĵoj, fotografaĵoj kronologie aranĝitaj). Ĉi tiu propono vekis iom da diskuto pro miskompreno, ke temas pri io eldonota; temas fakte nur pri konvena arango por konservi arkivan materialon. Ankaŭ tiu propono necesigos kunlaboron flanke de la usona esperantistaro, kiu provizu la materialon por tiuj albumoj.

Ĉiujn tri proponojn de la arkivisto la Kongreso aprobis brakleve, per granda plimulto.

Eble utilis ripeti ĉi tie, ke la adreso de la ELNA-Arkivo estas: 62 Via Castanada, Monterey, CA 93940, kaj ke oni rajtas sendi al ĝi materialon per la tre malmultekosta biblioteka poŝtotarifoj (9 cendoj por unu funto, po 4 cendoj por ĉiu plia funto!).

Sekvis mallonga reklamo por la Zamenhof-portreto de Laura Dreyer, kiu debutis kaj havis grandan debiton dum la kongreso. La desegninto estas filino de la konata esperantisto Hal Dreyer. La portreto estas gravuraĵo, presita nigre sur bela papero, tute taŭga por enkadriĝo kaj pendigo sur iu muro; la grandeco estas proks. 8½ x 11 koloro; ĝi estas havebla ĉe la ELNA-libroservo.

Pri la financa raporto prez. Harmon klarigis la malfacilaĵojn, kiuj rezultas el malebleco ĉiutage kalkuli la valoron de la inventaro. Tiun problemon certe mildigos plena utiligo de la karto-grupiga maŝino Randomatic, kiun ELNA lastatempe aĉetis uzita je tre malgranda kosto. Li atentigis, ke ELNA ankoraŭ bezonas mecenatojn por ke ĝi povu konstrui firman kapitalan fundamenton.

Kelkaj kongresanoj demandis pri la imposta statuso de ELNA. Prez. Harmon informis, ke donacoj al ELNA estas, ene de la kutimaj juraj limoj personaj, depreneblaj de la sumo de nespezoj imposteblaj. Donacoj al organizaĵoj kun eksterlanda sidejo, kiel UEA, bedaŭrinde ne havas tiun avantaĝon. Li konsilis, ke oni sin turnu ciam al specialisto pri impostaj aferoj aŭ advokato por respondo al specifaj demandoj tiaj.

La dua ĝenerala kunveno finiĝis per omaĝo al Ralph Bonesper, kiu forpasis antaŭ kelkaj jaroj sed kies postlasaĵo, pli ol dek ses mil dolaroj, nur ĉi-jare venis al ELNA.

Post la kunveno oni transiris al alia konstruaĵo ĉe la universitato por spekti anglalingvan filmon pri Zamenhof, kiun la kongreso luis de la Pola Arta kaj Kultura Fondaĵo de San-Francisko. Ankaŭ la ĝenerala publiko estis invitita al la filmo.

En la vespero okazis la Kongresa Bankedo ĉe la fama ĉinstila restoracio Kvar Maroj. Post bonega kaj ampleksa manĝo oni aŭdis paroladojn de George Roberts, pri Esperanto kaj la usona revo, kaj de William Auld, pri Usono kaj la esperanta revo. Mag. Auld, fariĝinte honora membro, utiligis la okazon por kritiki siajn samliganojn pri nesufiĉa parola uzo de Esperanto. Li donis sian opinion, ke unu monata kunveno ne sufiĉas por atingi bonan konversacian nivelon, kaj ke prefere oni kunvenu unu fojon semajne, kaj krome eluzu ĉiujn aliajn okazojn paroli esperante kun esperantistoj. Transirante al la stato de Esperanto en Usono, li antaŭvidis, ke Esperanto neniam fariĝos amasmovado en Usono. Sed tio ne necesas por efektiviĝi niaĵ celon, ĉar la kvalito de la usona movado povos pli ol kompensi ĝian relative malaltan kvanton.

Ankaŭ ĉe la bankedo okazis la afiŝkonkursaj juĝado. Entute ni ricevis sep afiŝojn, el kiuj tiu de ELNA-ano Dan Mason gajnis la unuan premion kaj tiu de David Reavis, loka nespeperantista artisto, la duan. Dankon ankaŭ al partoprenintoj James H. Parks, Peggy Doneis Schneider, William J. Lytle, Elinjo Gibson kaj Shaul Schecter.



Bankede: William J. Ford, Bonnie Hilton, James F. Cool.

PLI OL MILDOLARA PROFITO!

La lasta ĝenerala kunveno okazis la postan matenon ĉe la neelĉerpeble ampleksa kaj bongustega matenlunĉo ĉe Hotelo Claremont en Berkeley.

Estis anoncitaj la venkintoj ĉe la balotado. Dorothy C. Jones restas kasisto; al la cetera estraro aldoniĝis Sara Ann Estling kaj William H. Schulze, kaj restas inĝ. R. Kent Jones. (Eksiĝis Albert Estling kaj Charles R.L. Power.)

Longan diskuton vekis propono de Marianne Lee proponi helpon de ELNA al la Monda Asembleo de Mondcivitanoj, kiu kongresis pasintjare en San-Francisko kaj tie uzis Esperanton kaj aliajn lingvojn. Ĉar ne estis tute klare, ĉu la propono celis kunlaboron kun MAM aŭ la Monda Serva Aŭtoritato, direktata de nova ELNA-membro Gary Davis, prez. Harmon invitis s-ron Davis mallonge klarigi la rilaton inter la du organizaĵoj. Post anglalingva klarigo de s-ro Davis, prez. Harmon atentigis, ke ELNA normale proponas helpon en la alprenado de Esperanto al kiu ajn grupo, kiu tion deziras, kaj ke tial la rezolucio estas superflua. Aliaj kontraŭstaris la proponon, car kunligiĝo kun tia organizo kun specifaj, ne de ĉiuj aprobataj politikecaj celoj, povus endanĝerigi la neŭtralecon de la Ligo. Al tiu partio aliĝis William



Bankede: Staras Mieko Daibuzono kaj Lisa Helmuth; sidas Charles Power, Janet Wise, Briĉjo Burg, Jim Cunningham.



Matenlunĉe: De dekstre, Armin Doneis, Audra Anderson, Roan Stone, Robert Hawkinson kaj George Rodenborn.

Auld, kies elokvento donis mortobaton al la propono. Ĉi malvenkis per 24 aprobaj voĉoj kontraŭ 44 malaprobaj.

S-ino Lee tiam faris duan proponon, ke ELNA ellaboru proponon al la Ministerio pri Sano, Klerigado kaj Sociala Sekureco (HEW) pri eksperimenta instruado de Esperanto en lernejoj. Ĉi tiun proponon oni unuanime akceptis.

Okazis diskuto kaj voĉdono pri tri proponitaj lokoj por la 25a ELNA-Kongreso. North Adams, MA, venkis kontraŭ Vaŝingtono, DC kaj Fort Lauderdale, FL. Tamen la proponinto de North Adams poste retiris sian proponon, kaj laŭ la decido de la estraro, ni efektive kongresos en Vaŝingtono.

La kongresa kasisto, s-ro Power, raportis pri neatendite granda profito, ĉ. mil kvincent dolaroj. (Poste vidiĝis, ke tio efektive estis nur iom pli ol mil kvarcent, tamen kontentiga sumo.) Pro la profito la Kongreso dissendos al la kongresintoj la novelon *La balenodento* de la usona kaj ja san-franciska verkisto Jack London, kies centjara jubileo estas 1976, en traduko de nia honora gasto William Auld.

Kongresferme oni staris silente kelkajn momentojn honore al dum 1976 forpasintaj membroj de ELNA.

Helpon en la preparo de ĉi tiu raporto la redaktoro ŝuldas unuavice al la oficiala protokolisto de la Kongreso, s-ro George Roberts; ankaŭ al William R. Harmon kaj Jonathan Cole, de kies raportoj kaj dosieroj li ĉerpis kelkajn faktojn.

ZAMENHOF-FILMO

Por detaloj pri luo de la filmo pri Zamenhof, kiun spektis la ELNA-kongresanoj (vidu la tiurilatan raporton), skribu al: Polish Arts & Culture Foundation, 166 Geary, San Francisco, CA 94108. Sciigu, ke temas pri la filmo pri la kreinto de Esperanto.

La sonregistraĵo estas havebla en du versioj: pola kaj angla (versio tute en Esperanto ne ekzistas). La polan version oni povas disaŭdigigi per ordinara projekciilo, sed por la angla necesas speciala projekciilo, kiu kapablas sinkronigi la filmon kun aparta registraĵo. Bedaŭrinde ne multaj lubutikoj havas tian specialan projekciilon; tamen oni povas enketi pri la havebleco de maŝino kiu povas samtempe montri 16-milimetran filmon ignorante la surfilman sonstrion, kaj samtempe aŭdigi sonon el aparta 16-milimetra filmo kun centra magnetostrio.

LA REDAKCIO ATENTIGAS

ke ĉi tiu estas duobla numero, kaj laŭ dato kaj (se niaj planoj plenumiĝos) laŭ amplekso. Nominala duobla numero estas tradicia rimedo per kiu malfruiĝinta gazeto grandpaŝe reatingas sian eldonritmon, sed plej ofte duobla amplekso mankas. Ni esperas, do, ke nia solvo ne altiros multajn riproĉojn.

Ni bedaŭras, ke ne akompanas ĉi numeron la nova eldono de la libroserva katalogo, kiu estas ankoraŭ preparata kaj, laŭ la nuna plano, eliros aŭ kun la venonta numero aŭ antaŭ ĝi, en aparta ekspedo. Intertempe bonvolu doni al la ĉi-numera librolista suplemento iom da atento; ĝi proponas kelkajn eksterordinarajn bonaĉetojn cele al mildigo de la lastatempa librostoka ŝvelo. Ne maltrafu la okazon!

DANKLETERO

S-ro Wm. R. Harmon,
Prezidanto de ELNA

Kara amiko-prezidanto,

Mi volas pere de vi esprimi mian dankon al la anoj de ELNA pro la granda honorigo, kiun ili faris al mi, nomante min Honora Membro. Vi scias, kiom mi amas Usonon kaj la usonan movadon, kaj mi tre, tre alte taksas tiun ĉi afablan geston.

Mi volas ankaŭ danki al la LKK kaj al vi mem pro tio, ke oni tiel malavare gastigis min ĉe la ELNA-Kongreso. Mi vere ĝuis ĝin.

Kun la plej amikaj sentoj, via

W. Auld

NI FUNEBRAS

La 26an de januaro mortis, 84-jara, Raymond T. Bye, emerita profesoro de ekonomiko ĉe la Universitato de Pensilvanio kaj multjara esperantisto. Li aŭtoris plurajn sukcesajn lernolibrojn de ekonomiko, el kiuj kelkaj tradukiĝis en aliajn lingvojn. Kiel kvakero, li estis aparte sentema pri la bezonoj de tiuj subpremataj per antaŭjuĝoj pro rasa, religia aŭ seksa aparteno.

Ĉe ELNA postrestas manuskripte lia traduko "La aventuro de la diablo-piedo", novelo pri Sherlock Holmes de Sir Arthur Conan Doyle. Estas notinde, ke s-ro Bye petis kaj ricevis permeson de la aŭtoro por publikigo de tiu traduko.

Ni kondolencas la filinojn kaj genepojn.

VOLONTULOJ SIN PREZENTU!

Aliloke en ĉi tiu numero troviĝas demandaro por eventualaj volontuloj-helpantoj al la Centro de Esploro kaj Dokumentado. Tiaj volontuloj estos bonvenaj el kiu ajn parto de la lando (aŭ de la mondo).

Ankau la prezidanto de UEA, d-ro Humphrey Tonkin, serĉas helpanton, ĉu plentempan, ĉu parttempan. Li aŭ ŝi prefere loĝu en la sama regiono, kiel d-ro Tonkin, nome en la regiono de Novjorko, Filadelfio kaj Vaŝingtono. Tia volontulo sciu skribi kaj paroli Esperanton, kaj tajpi. Li aŭ ŝi estu preta vojaĝi al Filadelfio de tempo al tempo. UEA proponas kompenson de ĉiuj kostoj, kaj eventuale ian aldonan stipendieton. La volontulo povus esti de kiu ajn aĝo, kvankam verŝajne la posteno estus aparte taŭga por juna homo. D-ro Tonkin ankaŭ serĉas homojn en Usono pretajn fari tajplaboron por UEA kontraŭ malgranda kompenco.

Interesitoj skribu rekte al D-ro Humphrey Tonkin, 35 Violet Lane, Lansdowne PA 19050.

RESPONDOJ al RIĈIGU VIAN VORT-TREZORON!

169
1d, 2a, 3a, 4a, 5c, 6b, 7b, 8d, 9a, 10a, 11c, 12c, 13d, 14c, 15a,

LA CINDRIGO DE SAM MCGEE

de Robert Service

Elangligis Sylla Chaves

*Strango kaj frenezo je sunnoktomezo
regas dum la strebado por oro.
Arktaj horizontoj plenas je rakontoj
sangfrostigaj pro ĝia hororo.
Ĉiujn priatestis Norda Lum', sed estis
plej horora el ĉiuj por mi
mia propra ago ĉe Lebarĝa Lago:
la cindrigo de Sam McGee.*

Estis Sam McGee el ŝtat' Tennessee,
kie ŝprucas kaj flirtas kotono.
Lasis hejman ĝojon, serĉis polusvojon...
La kial' kuŝas en Dia kono.
Ĉiam li malvarmis, sed Or-land' lin ĉarmis,
kaj li ja ne sukcesis foriri,
kvankam "Viv' demono estas ja pli bona
en la fajro!" ni aŭdis lin diri.

Iam, dum Kristnasko, estis peza tasko
vadi laŭ Dawson-vojo kun hundoj,
dum la vento hajla nin traboris najle
tra la faldoj de l' lano, ĝisfunde.
Se okul' fermiĝis, tio ja sufiĉis
por ke frosto premiĝu sur ĝi.
Malagrabla estis, tamen nur protestis
la voĉo de Sam McGee.

Tiun nokton mem, dum en korporep' ni
plenveste sub neĝon nin metis,
hundoj estis sataj, kaj en for' vidataj
la stelaroj senhalte baletis—
"Ĉefo" jen li diras, "certe nun mi iras...
verŝajne estas la fin',
do mi laste petas...ĉu vi ĝin akceptas?
ĉu vi ĵuras, ke vi helpos min?"

Jesis mi sen honto, ĉar nea respondo
estus manko de karitato.
Li sopiris: "Mi, en tiu glaci',
ĝis la ostoj malvarmas, frato.
Morto min ne ĝenas...sed mi abomenas
havi tombon por mi glaci'an.
Do promesu, ke—ĉu laŭ leĝ' aŭ ne—
vi cindrigos restaĵon mian!"

Grandas en efiko peto de amiko
preskaŭmorta, mi ĵuris pro tio.
Brilo de aŭror' nin trovis for,
sed fantome li palis, ho Dio!
Al la sled' sinprema, ŝajnis li revema,
kaj deliris pri Tennessee;
antaŭ noktofalo venis la fatalo:
jam kadavro, jen Sam McGee.

Tra l' aer' sen vento, en la mortsilento,
en hororo mi kuris, sen ĉeso,
kun la pezo kroma de restaĵo homa,
kiun ligis al mi promeso;
dum ni rapidiris, ŝajnis, ke li diris,
enŝnurita senkovre, post mi:
—Lace aŭ hantite, estas promesite,
vi cindrigos ja tion ĉi!

Ja finiĝas ĵur' per plenumo nur...
estas ŝuldo, laŭ kodo de l' pado.
Miaj lipoj mutis, sed la kor' balbutis
mil protestojn, dum nia vagado;

kaj, dum fajro brulis kaj hundar' ululis
en la vastan senhejman neĝlandon,
kiel mi malbenis...kiel abomenis
tiun palan akompananton!

Frumatene (ŝajnis) plian pezon gajnis
la kvieti mortaĵo por mi;
hundoj lace spiris, tamen ni pluiris...
da mangaja malpli kaj malpli...
Tra l' malbona pado, en frenezirado,
mi klopodis fortigi min mem
per ĝojiga kanto, kaj la kuniranto,
la aĉul' aŭdis min kun ridem'...

Mi kaj mia ŝarĝo apud Lag' Lebarĝo
haltis ĉe forlasita eksdomo...
estis neĝkovrita...tamen tuj vidita
estis Alice May, ĝia nomo.
Mi rigardis kaj, kun subita gaj',
pensis pri la kunulo glacia,
kaj ekkriis mi: "Tiu domo ĉi
estos la cindrigejo mia!"

Lignon hakis for el la planko, por
ekbruligo de forno, laŭ povo.
Prenis el angulo, ĵetis al la brulo,
ankaŭ karbon...bonŝanca eltrovo!
Estis bela flamo. Ja malofte samo
kaŭzas tiel mirindan ekbrulon.
Truon faris mi, kaj metis en ĝi
Sam McGee, la glaci'an kunulon.

Do mi ekpromenis, ĉar min multe ĝenis
vidi mian amikon forbruli.
La ĉiel' ekbruis, vento ĉion skuis,
kaj la hundoj komencis ululi.
Meze de l' glaci', sur la frunto mi
ŝvitis varme, sed marŝis antaŭen.
Grasa ondo fuma en mantel' malluma
surĉiele sin ĵetis ĉirkaŭen.

Mankas la memor', kiel longe for
mi batalis kontraŭ la timo,
sed je vido de la frua danco stela
mi kuraĝis la rea proksimo.
Eĉ malsanis mi, sed decidis pri
ekrigardo, ĉu ĉio en ordo.
—Fajro, jen mi diris, certe lin kuiris!
Mi kuraĝe malfermis la pordon.

Meze de la flam', pace sidas Sam,
ekrigardas, plezure ridetas
kaj parolas: —Pasu, sed la pordon lasu
tuj fermita, karulo, mi petas.
Tie ĉi komfortas, tamen vi kunportas
la malvarmon kaj ŝtormon kun vi,
kaj mi timas, ĉar mi ĵus komencis varmi
unufoje post Tennessee.

*Strango kaj frenezo je sunnoktomezo
regas dum la strebado por oro.
Arktaj horizontoj plenas je rakontoj
sangfrostigaj pro ĝia hororo.
Ĉiujn priatestis Norda Lum', sed estis
plej horora el ĉiuj por mi
mia propra ago ĉe Lebarĝa Lago:
la cindrigo de Sam McGee.*

NOVAJ MEMBROJ

157. Auld, William
20 Harviestoun Rd., Dollar, Clacks., Skotlando FK14 7HG
158. Beesley, Kenneth Reid
1457 Wilton Way, Salt Lake City, UT 84108
159. Blair, ges-roj Robert W.
Linguistics Dept. 144FB, Brigham Young Univ., Provo UT 84602
160. Braden, Kenneth S.
JHP-Ward 3, St. Elizabeth's Hosp., 2700 M.L. King Ave. S.E., Washington, DC 20032
161. Brande, Max
4019 W. 175th St., Torrance, CA 90504
162. Cahill, Celia T.
555 Hacienda Ave. #107, Campbell, CA 95008
163. Clay, Alphonse M.
3008 N. Sawyer, Chicago, IL 60618
164. Courson, William A.
610 Sewall Ave. #2M, Asbury Park, NJ 07712
165. Davis, Garry
World Service Auth. III, 1100-17th St. NW, Washington DC 20036
166. Giannini, Ward M.
404 Clubhouse Dr. NW, Roanoke, VA 24019
167. Gianopoulos, Elizabeth A.
2550 Golden Gate Ave. #2, San Francisco, CA 94118
168. Gonzales, Gilberto R.
3401 N. Columbus #22-C, Tucson, AZ 85712
169. Greer, Paolo
Box 543, Fairbanks, AK 99707
170. Guilfoyle, LaVerne
153 Clipper St., San Francisco, CA 94114
171. Israel, David
15 E. 26th, 10th Fl., New York, NY 10010
172. Kindberg, Edwin A.
1548 Lafayette Dr., Columbus, OH 43220
173. King, Charles G.
5146 Camden St., Oakland, CA 94619
174. Lownie, Marion B.
2912 Wellesley Dr., Columbus, OH 43221
175. Lytle, William J.
255 Emporia #17, San Antonio, TX 78209
176. Majka, Jerry
2004 Fairview Ave., Mt. Penn, PA 19606
177. McClure, David
3555 Copley Ave., San Diego, CA 92116
178. O'Dell, Patti Combs
Tr. 1 Box 79, New Market, IA 51646
179. Sanchez, Carlos
Box 22915-UPR, San Juan, PR 00931
180. Sayle, Donna M.
629 Hampshire Ave. #3, Redwood City CA 94063
181. Sosebee, Leslee David
1111 Burke #201, Pasadena, TX 77506
182. Tusanov, Zoran
